

Fajrero_{n-ro} 2

ESPERANTO-FAKO DE ZK ROH "TŘINECKÉ ŽELEZÁRNY"

SUPREN AL LA STELOJ.

Kiel knabo mi senspire legadis fantaziajn romanojn de la genia verkisto Julio Verne kaj kune kun liaj herooj travivadis iliajn danĝerajn aventurojn.

Mi opinias, ke hodiaŭ eĉ la plej fantaziaj songoj de l' nomita genio ne nur plenumiĝis . . .

Sed tamen la sciiĝo pri la kosma flugo, efektivigita en aprilo 1961 per soveta kosmonaŭto majoro GAGARIN, mirigis tutan mondon. La soveta scienco kaj tekniko denove venkis!

La nomo de J. A. GAGARIN kaj la tago de lia kosma venko - la 12-a de aprilo 1961 estos per oraj literoj enskribitaj en la historion de la homaro.

Sopirege mi atendas sciigojn pri pluaj eksperimentoj de scienculoj kaj teknikistoj. Mi kredas, ke pluaj kosmaj venkoj b a l d a ŭ sekvos.

Jar. Novotný

SOMERAJ ESPERANTO-TENDAROJ 1961 EN ARGĜENTA GOLFO Ĉ VALBARAĴO VRANOV

Ni devas danki al esperantisto, kiu ekkomprenis gravecon de en propaganda laboro.

Jam unu monaton antaŭ la komenco ĉiuj lokoj en ĉiuj etapoj estas okupitaj. Al supera kurso en Trenĉianské Teplice aliĝis pli ol 100 ges-anoj.

Instruistaro estas jam kompleta kaj invitita de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato al tritaga instrukurso, kie estos prezentitaj ĉiuj detalaĵoj. Ankaŭ teĥnika ekipo de la tendaro estis plibonigita per oferema brigadlaboro.

Instruado estos nunjare akomodita tiel, ke frekventanto de D-kurso estu kapabla fari instruistan ekzamenon laŭ nove proponitaj ekzamenkondiĉoj. La preparokomitato de SET-1961 esperas, ke serena vetero, kiu jam estas mendita, pliagrabiligos vian restadon ne la tendaro.

D. Kočvara

SUR LA PONTO DE AMIKECO

Sub tiu titolo aperis ĉefartikolo en la ĵurnalo de la Hungara fronto, okaze de la vizito de kamarado Antonín Novotný, prezidanto de Ĉeĥoslovaka Socialista Respublikon en Hungario.

La traktado pri komunaj agadoj ekonomiaj, sciencaj kaj teknikaj kaj progresigo de la reciproka varinterŝanĝo okazis en la atmosfero de vera interkompreno kaj samopinio.

La artikolo konigas la mulcentjaran komunan sorton, la komunan batalon

kontraŭ la subpremado de Habsburgoj. Ambaŭ popoloj kune batalis en la armeoj de Rákoczi kaj Kossuth kaj inter la ruĝaj soldatoj en 1919 estis multaj Ĉeĥoj kaj Slovakoj, celantaj forigi ekspluatigan, subpreman regadon. La hunaraj kaj ĉeĥaj estroj ofte klopodis per artefaritaj baroj, naciaj antaŭjuĝoj, per flamigo de ŝovinismo, venenigi la laŭnaturan amikecon de la popoloj. Sed la radikoj de la ĉeĥoslovaka – hungara amikeco vivis en la profundo de la koroj kaj oni ne povis ilin ekstermi. Post liberiĝo tra mil vojoj fluas al al ni la helpa preteco de la ĉeĥoslovaka popolo: per modernaj maŝinoj plifaciligi, progresigi laboron en hungaraj fabrikoj kaj sur kampoj. Multan ĝojon donis kaj donas la Zetor-traktoroj, la rapidaj Škoda-aŭtoj, kaj kiam antaŭ kelkaj jaroj hungaraj kaj ĉeĥoslovakaj inĝenieroj kaj laboristoj per komuna laboro konstruis ponton super Danubo apud Komárno - kie iam naskiĝis la hungara romanverkisto Jókai - ĝi ricevis la nomon "LA PONTO DE L' AMIKECO".

La vizito de k-do Novotný kreis novan ponton inter du nacioj. Sed, kiel skribas la ĉefartikolo, tio estas nur u n u okazo inter la frataj popoloj. Ja de jaro al jaro ĉiam pli multaj neoficialaj "diplomatoj" iras trans la limon. Miloj da turistoj el Ĉeĥoslovakio vizitas nin kaj iras de ni al Ĉeĥoslovakio. Oni esperas plian evoluon de la kunlaboro, pli ampleksajn amikajn interrilatojn.

Kaj ni povas aldoni, ke en tiu senco sentas kaj agas la esperantistoj de du landoj! Inter la reciprokaj turistaj grupoj ĉiam estas multaj esperantistoj, kiuj en ambaŭ landoj per internacia lingvo trovas amikojn kaj konigas sian hejmon en la grup-kunvenoj, por kunporti ties varmajn salutojn. Ni deziras, ke tiu rekta kaj efika kontakto per Esperanto plivastiĝu per korespondado, per vizitado, sed ankaŭ per reciproka legado de revuoj, literaturaĵoj, ĉar la internacia lingvo estas por ni la plej larĝa, kvankam nevidebla ponto de l' amikeco"!

Pál Balkányi, Budapeŝto

- o -

Okaze la vizito de prezidanto Novotný la budapeŝtaj esperantistoj sendis komunan solidaran saluton al ĉeĥoslovakaj Esperantistoj je la adreso de Esperanto Klubo en Praha.

PROPONO AL ESPERANTISTOJ FOTOAMATOROJ.

Ĉeĥoslovakio estas lando riĉa je historiaj memoraĵoj de Esperanto movado (monumentoj, memortabuloj, Zamenhofstratoj, parkoj k.s.). Se ĉio estus komplete kolektita en formo de koloraj diapozitivoj kun detala priskribo, ĝi prezentus tre interesan paroladon kun bilda akompano. Ĝis fino de julio skribu al mi, kion vi proponas fotografi. Mi al vi skribos, kiom foje vi faru la saman bildon kaj poste ni faros reciprokan interŝanĝon. Tio signifas, ke ekzistos bildaj kompletoj ĉe ĉiu, kiu partoprenos mian proponon. Ni laboros je kolora diafilmo 24 oble 36 mm.

Mi povas fotografi esperantomonumenton en Ostrava Zábřeh, esperantomonumenton en Bohumín, esp. monumenton en Kopřivnice kaj esp. muzeon en Kopřivnice. Ankaŭ mi prizorgos detalan priskribon de ilia deveno.

Partoprenu multnombre! Se propono sukcesos, povos ĉe mi aliĝi interesuloj, kiuj volus tutan kompletan aĉeti. Helpu vastigi konojn pri historio!

Drahomír Kočvara, Ostrava Kamenec

LA ŜAKO KAJ ESPERANTO.

La ŝakludo havas internacian karakteron. Estas aranĝataj internaciaj ŝakturniroj kaj problemkonkuroj, en ĉiu kulturŝtato eldonataj ŝakrevuoj registras krom la enlanda ŝakvivo ankaŭ la pli signifajn ŝak-okazintaĵojn eksterlandajn kaj la maturaj ŝakludistoj sekvas gravajn teoriajn novaĵojn en la malfermoj kaj en la finludoj, eltrovitajn kie ajn en la mondo.

Estas mirinde, ke la ŝakpubliko ankoraŭ ne plene konsciiĝis pri la granda signifo de Esperanto por la kulturfako, kia estas la ŝakludo. En tiu direkto estas farita ĝis nun nur malgranda progreso. Antaŭ la dua mondmilito aperadis dum kelkaj jaroj Esp. ŝakrubriko en sveda ŝakrevuo "Schackvärlden" kaj la ŝakanguloj en Esp. revuoj "Esperanto" kaj "Heroldo de Esperanto". Antaŭ nelonge la ŝakangulo en "Esperanto" kaj "Nuntempa Bulgario" rekomencis. Esperanta ŝaklibro aperis eble nur unu - malgranda kolekto de la ŝakproblemoj. En la jaro 1920 en Vieno projektita Esp. ŝakrevuo "Internacia ŝako" ne realiĝis.

Tre utilis al la ŝakvivi, se estus eldonitaj Esperantaj ŝakrevuoj kaj turnirlibroj. Malgrandaj nacioj ne povas eldoni la turnirlibrojn en sia lingvo por pli larĝa forumo. Ekzemple unufoje skribis la angla ŝakrevuo pri ĉeĥa turnirlibro, ke "la glosoj al la partioj bedaŭrinde estas skribitaj en malmulte konata lingvo!"

La kulmina monda ŝakorganizo FIDE ĝis nun ne trovis komprenon por Esperanto, kiel rezultas el freŝdata mencio en la revuo Ogonok: "Kiel konate, la franca, germana kaj rusa lingvoj estas oficialaj lingvoj de FIDE. La reprezentanto de Hollando proponis, por ke ĉiuj delegitoj lernu Esperanton. "Mi petas, lernu!" - tia estis lakona respondo al la hollanda delegito.

La sola vojo por penetrado de Esperanto en la ŝakajn rondojn konsistas nedubinde en tio, ke estu abunde aranĝataj Esperantaj korespondturniroj kaj la esperantaj ŝakistoj aspiru la ŝakangulojn en la plejparto de la E-revuoj. Per tio estos preparita la fundo por eldonado de la daŭra, digna Esp. ŝakrevuo kaj pluaj Esp. ŝakverkoj.

K. Libenský

MAJA TRIOLETO.

Plej bela fest' - unua Tag' de Majo!
Ĝi estas festo de Natur kaj Kreo,
en tiu tago ĉie regas gajo!

Plej bela fest' - unua Tag' de Majo!
En urbo, en vilaĝ', sur kajo -
solenas ĉie nia Pacarneo!...

Plej bela fest' – unua Tag' de Majo,
ĝi estas festo de Natur' kaj Kreo!

G. Deŝkin. 1960 j.

Por nia legantaro ni ricevis unuamajan salut-poemon de Georgo Deŝkin, kiun ni volonte publikigas.

- x 0 x -

AL FAJRERO.

Hodiaŭ mi legas modestan "Fajron".
Mi ĝin foliumas, atente legante,
Kaj sentas anime en ĝi la Esperon
Por ĉeĥoslavaka movad' Esperanta.
Mi ĝin foliumas, atente legante.
Mi flaras la farbon, mi palpas paperon,
Kaj tra kilometroj mi estas vidanta,
Briladon kaj lumon de via "Fajrero".

Mi sentas anime en ĝi la Esperon,
En ĉiu vorteto desegno kaj foto,
Kaj de Vi afable sendita numero,
Fariĝas por mi de l' printemp miozoto.

Por ĉeĥoslovaka movad' Esperanta,
Mi sendas salutojn elkore sincerajn.
Prosperu, disfloru, por Pac' batalante
Gazet' junulara, modesta "Fajrero".

Petro Poliŝĉuk

LA AZENO

(Vera okazintaĵo)

Foje mi veturis de Varna al Sofio, por ĉeesti Esperanto-kongreson. En la sama kupeo veturis gesamideanoj: junuloj, plenkreskuloj, pliaĝuloj kaj la malnova, blankhara esperantisto - baj Petr.

En la gaja societo oni parolis pri kaj en Esperanto. Subite en la kupeon ŝoviĝis juna homo, laŭmode vestita, ĵusrazita, parfumita, unuvorte - dando. Tiu ĉi juna homo kies sola celo en la vivo estis bone manĝi, bone trinki kaj amuzi fraŭlinojn, kaj kiu pensis pri si, ke li estas eksterordinare sprita, ĉarmanta kaj ŝatis ĉion kritiki (nenion sciante), interrompis la parolon - baj Petr - kiu dume rakontis pri utiligo de ESPERANTO dum vojaĝo tra la mondo, kiun li faris en sia junaĝo. La juna homo, kiel oni diras "ŝovis la nazon en fremdan vazon", senceremonie kaj arogante esprimis sian malbonan opinion pri Esperanto, pri esperantistoj (ke ili vane perdas tempon, ke ili estas fantaziuloj eĉ frenezuloj, k.t.p., k.t.p.)

Anstataŭ respondi, baj Petr atentigis la vojaĝantojn kaj rakontis la jenan veran historieton: "Antaŭ multe da jaroj en unu lando loĝis fama reĝo. Lia nomo estis SOLOMON. Foje li ordonis al la servantaro venigi la hejmbestaron en la palackorton. Li sidis sur la trono kaj ĉiu besto devis preterpasi lin.

La ceremonio komenciĝis. Solomono atente observadis. Preterpasis la bovo kun sia familio: bovino, bovidoj, bubalo, bubalino, bubalidoj. Sekvis kun siaj familioj: la kamelo, elefanto, kapro, ŝafo, hundo k.a. En la kolono viciĝis ankaŭ la

ĉevalo kun sia tuta familio - ĉevalino, ĉevalidoj, mulo kaj azeno. La ĉevalo - konsiderante la kaprican, malobeeman karakteron de la azeno - sin turnis al la lasta kun la vortoj:

"Aŭskultu, azeno, nun ni preterpasos la tronon de la saĝa reĝo Solomon. Mia devo estas averti vin, ke vi ne faru ian azenaĵon en tiu ĉi loko, antaŭ la reĝo. Mallevu la voston kaj preterpasu kviete, humile. Montru obeemon!" "Jes, jes! Mi scias kion fari. Estu tute trankvila!" - respondis la azeno. Sed kio okazis! Vere, la azeno ekmarŝis bone, konsiderante la konsilojn de la ĉevalo. Tamen ĝuste antaŭ la trono de la reĝo Solomon ĝi haltis, levis fiere la kapon kaj laŭte ekmuĝis. Levis kaj ĉiuflanken svingis la voston. Piedfrapis, kelkfoje saltis . . . kaj alkuris la grupon de ĉevala familio. La ĉevalo konsternita kaj hontanta akre riproĉis la azenon pro tio, ke ĝi per sia malbona konduto hontigis la tutan ĉevalan genton.

La azeno trankvile diris: "Se mi portas tiun ĉi indan nomon, mi en tiu ĉi loko devas montri mian kapablon!"

La ĉevalo enpenŝiĝis, turnis sin al la familiano kaj diris: "Jes, vere! LA AZENO ESTAS ĈIE KAJ ĈIAM NUR AZENO!"

Ankaŭ inter la homoj estas azenoj!

Oni multe parolas pri paco, amikeco, frateco, solidareco, pri konstruo de ponto por irinterkompreniĝo inter la popoloj, sed ili estas blindaj kaj ne vidas, ke unu ponto jam ekzistas. Ĝi estas la genia Zamenhofa verko - la INTERNACIA LINGVO ESPERANTO. Sed estas obstinaj azenoj, kiuj timas alpaŝi tiun ĉi ponton! Kial? Ĉar ili estas azenoj! Kaj la azeno ĉie kaj ĉiam estas nur azeno!

La juna homo, ruĝiĝanta de honto, prenis siajn kofrojn kaj ĉapelon kaj eliris la kupeon.

Petro

NIA SPEGULO.

FILMO PRI SOMERAJ ESPERANTO - TENDAROJ.

En klubo de ostravaj tramistoj estis 15.5.1961 projekciita amatora filmo pri SET Lančov 1960. La filmo brile pliriĉigis programon de la kunveno. Bonan impreson kaŭzis magnetofona akompano. Ni rekomendas prunton de la menciita filmo kaj sonbendo ĉe s. Pavel Sittauer, Třebíč, Riegrova 62.

LUMBILDOJ PRI GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO.

En Esperanto-fako de ZK VŽKG estis 26.5.1961 projekciitaj 150 koloraj diapozitivaj pri Germana demokrata respubliko kun vorta akompano de Vlastimil Kočvara.

ESPERANTO EN BULGARIO

Laŭ statistiko el gazeto "Bulgara esperantisto" ekzistas en Bulgario esperantaj kluboj en 122 lokoj kun 4398 membroj. Bulgara Esperanto-asocio volas gajni en Sofio propran konstruaĵon. Unuaj kontribuaj kaj donacoj atingis jam sumon 20.000 levojn. En jaro 1963 okazos en Sofio 48-a Universala kongreso de Esperanto.

ESPERANTO EN GAZETARO.

Filatelie n-ro 9 (Praha, 1.5.1961) priskribis en tre ampleksa artikolo ĉiujn ĝis nun eldonitajn pri-esperantajn poŝtmarkojn.

Mladý svět (n-roj 18, 19, 22. Praha 1.5., 8.5., 29.5.) diskutas pri Esperanto. En la lasta artikolo (n-ro 22-a) bedaŭrinde montriĝis, ke aŭtoro subskribita "JKL" havas bazajn malkonojn pri Esperanto ĝenerale.

El Pollando ni ricevas gazeton "Ilustrowany Kurier Polski", en kiu regule aperadas artikoloj pri Esperanto-movado, kiuj tre precize informas legantaron pri ĝi. Ni gratulas al polaj samideanoj.

LA MOVADO EKSTERLANDE NOVA HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO

Multaj interesiĝis pri la fondiĝo de la nova HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO. Pri tio skribis interesan kaj gravan artikolon en la ĵurnalo de Sindikata Landa Konsilantaro – NÉPSZAVA (Voĉo de la Popolo), konata hungara ĵurnalisto Imre Szenas. La artikolo publikigas la deklaron de vicprezidanto de Asocio – Borbala T. Szeremi, multdekjara laboristmovada batalantino por kaj per Esperanto. Ŝi memoris en sia deklaro la heroan tempon de iama hungarlanda laborista agado, el kies kunlaborintoj kelkaj martiriĝis pro la proletaj ideoj. Inter ili ŝi menciis Sándor Fürst, György Kilian kaj sian amikino, Kató Hámán, kiun multaj esperantistoj konas tutmonde el hungaraj poŝtmarkoj. Jam tiam la laboristkursoj kaj kunvenoj de Esperanto okazis ĉefe en sindikatoj. Post la liberiĝo de la lando el la faŝista subpremo, la hungara esperantistaro kuniĝis en unu societo. Sed por kelkaj jaroj tiu devis ĉesi sian agadon. Depost 1955 gvidis la movadon Landa Konsilantaro. Nun kun laŭleĝaj statutoj fondiĝis la nova Asocio sub patronado de Sindikata Landa Konsilantaro. La estraro de Asocio konsistas el la plej bonaj kaj konataj hungaraj esperantistoj. Ni atendas sukcesan, progresan laboron, konstruante novan, pacan mondon.

- o O o -

ĈU ESTOS UEA NOBELPREMIITA POR LA JARO 1961?

Kiel ni povis legi en "Revuo de Esperanto" kaj ankaŭ en aliaj esperantaj gazetoj, estis proponite de Komitato de Nobelpremio, ke UEA estu premiota per paca premio por la jaro 1961, por meritoj en alproksimiĝo de nacioj kaj internaciaj rilatoj. Eventuala ricevo de ĝi, estus esprimo de respekto al laboro de tutmonda esperantistaro.

EN LA HUNGARA RADIO profesoro Géza B á r c z y, direktoro de Lingvistica Instituto respondis al demando en la Radio-Leksikono pri la Internacia lingvo kaj klarigis tre favore la uzadon, utiligon kaj disvastigon de Esperanto. Tamen - laŭ li - Esperanto ankoraŭ ne ludas rolon de internacia lingvo. Ni povas al tio rimarki, ke en la kadro de sia nuna disvastigo, por multaj dekmiloj, kiuj lernis ĝin, Esperanto estas fakte la internacia lingvo, kiu kunligas, edukas, instruas kaj disvastigas la kulturon de diversaj popoloj.

FONDIĜIS INFORMA FAKO DE FEJ.

Organiza kresko de Pola Esperanto-Junularo kaj samtempe kreskanta interesiĝo pri Esperanto en la junularaj medioj de Pollando kreis la bazon fondi apartan Informan Fakon de PEJ.

Post preparlaboroj fondiĝis nun la Informa Centro de Pola Esperanto-Junularo kiel bazo de laŭtempe organizota multelementa Informa Fakoj. En kadroj de Informa Centro funkcios landa Koresponda Servo kaj Fotoservo.

Organizo de Informado pri esperanto en polaj junularaj asocioj (ZMS, ZMW, ZSP, ZHP), koordinado de laboro de junularaj rondoj de PEJ kaj esplor-dokumenta laboro de junulara Esperanto Movado estas la ĉefaj taskoj, plenumendaj per Informa Centro de PEJ.

Sukceso de tiu grava iniciato dependos multe de vasta kaj bone organizata reto de konstantaj kunlaborantoj en- kaj eksterlandaj. Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Junularo turnas sin do al Esperantistaj junularaj organizaĵoj, kluboj, grupoj kaj samideanoj, kiuj povas kunlabori, kun peto, ke ili ekligu kontakton kun Informa Centro - adreso:

Informa Centro de PEJ, ul. Kraszewskiego 56/7, TORUN, Pollando.

- o O o -

EL LA VIVO DE E-RONDETO ĈE ZK ROH TŘINECKÉ ŽELEZÁRNY

La agad-plano por I-a kvaronjaro, publikigita en 1-a n-ro de Fajrero, estis ĝenerale realigita, krom prelego de prof. Kilian (pri Hispanio), kiu estis forŝovita por aŭtunaj monatoj.

E-rondeto ĉe ZK ROH Třinecké železářny aranĝis en la tagoj de 9. - 13. 1961 aŭtobusan ekskurson tra meza kaj suda Bohemio. En urbo, en kiu la ekskursantoj tranoktiĝis, ili renkontiĝis kun lokaj esperantistoj. Ekskurson partoprenis kelkaj amikoj de nia E-rondeto, red. de Ilustrowany Kurier Polski, Kazimierz Małycha el Bydgoszcz.

Aŭtobusa ekskurso al Strážnice la 1-an kaj 2-an de julio estis la plua aranĝaĵo, kiun E-rondeto de ZK ROH Třinecké železářny organizis en la jaro de 40-jara jubileo de fondiĝo de KSC.

RECENZOJ

Prof. Delhí Dalmau: Esperanta resumo de la Stenologio kaj Stenografio. (15 pĝ., Barcelona 1961). Havebla ĉe la aŭtoro en Barcelona, Lauria 98, Hispanio, por 2 int. resp. kup.

Jen resumo de verko, kiun la aŭtoro (Akademiano) originale eldonis en hispana lingvo. Stenologio estas scienea bazo por internacia aŭ interlingva stenografio. Post 30-jara esplorado la aŭtoro venis al konkludoj, ke por similaj lingvosonoj devas en stenografio ekzisti similaj signoj (li diras stenoj) kaj ke stenografio devas esti kursiva. Tiu penso estas rimarkinda: la aŭtoro montras sian kursivan stenografian alfabeton en lingvoj angla, franca kaj esperanta, sed en lia patrolando kaj en landoj angl- kaj

franclingvaj speciale la geometriaj sistemoj estas plej uzataj. La ekzemploj pri stenografia skribado estas nur en Esperanto. La sistemo estas prezentita koncize, sen mallongigoj aŭ "sigloj", sur fonetika bazo, kaj sendube bone servos al ĉiu, kiu ĝin lernos.

Adolf Staňura

Petar, Gunio: Sekretoj de l' marestaĵoj, reverkita de Lic. Marinko Ĝivoje, eldonis Kroatia Esperanto-Servo, Zagreb 1960.

La libro kun popularscienca temo. Ĉi-specaj libroj tre vastiĝas en naciaj lingvoj. Ankaŭ en Esperanto iam post iam aperas tia libro, sed ĝis nun tre rare.

Kiel oni diras en la postparolo en la libro, ĝi estas "romano pri la fiŝoj kaj pri la interesa vivo en la maro. La aŭtoro ĉiam eksplikas ekeston kaj originon de la nomoj ĉe la maranimaloj, ĉar la nomo ofte ion diras pri la aspekto aŭ vivo de animalo. - La libro enhavas multajn ilustraĵojn. Tio multe helpas al la leganto, imagi al si la bestojn. Sed kelkloke estus bone aldoni ankoraŭ kelkajn skemojn por fari al si pli bonan imagon ĉe la eksplikado de la aferoj malfacile imiĝeblaj, ekzeple nutrado de funguloj, funkciado de "piedetoj" ĉe la marstelo k.s. Pli bone ankaŭ estus, se la titoloj de bildoj estus tuj ĉe la bildo mem, anstataŭ sur la listo fine de la libro.

Laŭ lingva flanko restas problemo pri nomoj de animaloj. En Esperanto estus du vojoj eblaj: aŭ uzi esperantigitajn sciencajn nomojn, plejparte latinajn, aŭ traduki la popularajn nomojn. En la libro estas uzataj ambaŭ. La unuaj diras ĉion al sciencistoj sed malmulte al nefakuloj. La duaj estas bone digesteblaj al nefakuloj, ĉar ili estas facile memoreblaj kaj ion diras pri la animalo. Jen kelkaj ekzemploj el la libro: alkroĉfiŝo - ekeneiso, ermitkrustulo - eŭpaguro, krifiŝo - skieno, segfiŝo - pristo, marforĝisto - zeo.

Josef Cink

A L V O K O !

GELERNANTOJ EL TUTA MONDO!

Pli ol ducent gelernantoj de Aŭtofaka Mezlernejo (Technikum Samochodowe) en Łódź, Pollando, Wolczanska str. 55, vokas vin al korespondado pri junularaj temoj, al interŝanĝo de bildkartoj, gazetoj esperantaj kaj nacilingvaj, sonbendoj ktp. Okaze de fino de lernejjaro la Esperanto-rondo organizos ekspozicion de esperantaĵoj kaj letervesperon. Skribu nepre kaj senprokraste! Sendu esperantaĵojn! Respondo garantiita!

Fajrero estas bulteno de E-junularo en Nordmoravio

Aperas laŭbezzone. Julio 1951, n. ro 2/1961

Eldonas: ZK ROK Třinecké železářny VŘSR, E-kroužek

Redaktas: Jan Pomykacz, Inĝ. Jan Werner, Jar. Novotný (responda)

Administras: VI. Kočvara Ostrava 8, Kamenec 3/251, ĈSSR - p.k. n-ro T-02-11518